

Emanuel Geibel,

Migrado

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Nun Majo alvenis,
 Burĝonas la arbar',
 Do restu en hejmo,
 Filistra homar'!
 La nuboj ĉe ĉielo
 Migradas jam for,
 Laŭ ili nun fortiras
 Min la migrama kor'.

2. Nu, patro, patrino,
 Adiaŭ nun al vi,
 Feliĉon ekstere
 Serĉadas nun mi,
 Ja, multe da vojoj
 Ne vidis mi jam
 Kaj multe da bonvino
 Nur konas mi laŭ fam'.

3. Antaŭen, antaŭen
 Dum hela sunradi',
 Trans montoj, trans valoj
 Kun vigla energi'!
 La fontoj murmuras,
 Bruigas arbojn vent',
 La koro kun alaŭdo
 Kunkantas pro kontent'.

...

Emanuel Geibel,

Nun Majo alvenis

tradukita de Ferdinand Pfeil

1. Nun Majo alvenis,
 Burĝonas la arbar',
 La nuboj formigras
 Tra landoj kaj mar',
 Aŭdiĝas en valoj
 Ĝojega birdkantad',
 Sopiras mi la mondon
 Travagi en migrad'.

2. Ho patro kaj panjo!
 Foriras mi kun Di',
 Fremdlandan feliĉon
 Serĉados nun mi;
 Ne paŝis mi ĉiujn
 Vojetojn en la rond',
 Ne trinkis mi ĉiun
 Bonvinon en la mond'.

3. Antaŭen, antaŭen,
 En bela sunbril'!
 El domo jam logas
 Alaŭdo per tril',
 La fontoj murmuras,
 Zumadas la aer',
 Ekĝojas mia koro
 En ĉarma la veter'.

...

Emanuel Geibel,

Der Mai ist gekommen

tradukita de Ferdinand Pfeil

1. Der Mai ist gekommen,
 Die Bäume schlagen aus,
 Da bleibe, wer Lust hat,
 Mit Sorgen zu Haus!
 Wie die Wolken dort wandern
 Am himmlischen Zelt,
 So steht auch mir der Sinn
 In die weite, weite Welt.

2. Herr Vater, Frau Mutter,
 Daß Gott euch behüt!
 Wer weiß, wo in der Ferne
 Mein Glück mir noch blüht;
 Es gibt so manche Straße,
 Da nimmer ich marschirt,
 Es gibt so manchen Wein,
 Den ich nimmer noch probiert.

3. Frisch auf drum, frisch auf drum
 Im hellen Sonnenstrahl!
 Wohl über die Berge,
 Wohl durch das tiefe Tal!
 Die Quellen erklingen,
 Die Bäume rauschen all;
 Mein Herz ist wie 'ne Lerche
 Und stimmt ein mit Schall.

...

4. Vespere en urbeto
 Gastigos min trinkej':
 "Ho, mastro, nur vinon,
 Sed de bongusta plej!"
 "Ekprenu gitaron,
 Gajega muzikant'!"
 "Prikantos mi knabinon,
 De kiu mi amant'."

5. Se mankos restejo
 Kun noktripoz' kaj vin',
 Sub ĉielo mi kuŝos,³
 La steloj gardos min,
 Bruanta tilio
 Lulados al dormad',
 La matenruĝo vekos⁴
 Denove al migrad'!

6. Migrado, migrado
 Libera ĝojo vi,
 En brust' freŝe blovas
 La spiro de Di',
 La koro ĝojegas
 Por la ĉirkaŭa rond',
 Ke vi do estas bela,
 Ho, vasta, vasta mond'!

...

4. En urbo vespere
 Gajigu min regal',
 Ekbrilu bonvino
 En klara pokal':
 Ekprenu gitaron,
 Gajega muzikant'!
 Pri mia dolĉulino
 Eksonu bela kant'!

5. Se foje mi dormos
 Sen lito sub mantel',
 La steloj min gardos
 Sub blua ĉiel',
 Per dolĉa murmuro
 Lulados min tili',
 Min vekos frumatene
 Unua sunradi'.

6. Migrado, migrado,
 libera vivoĝoj'!
 Ĉar Dia spirado
 Min tuŝas en voj',
 La koro ĝojegas
 De l' mont' al mara ond'
 Vi estas belega,
 Vi vasta, vasta mond'.

...

4. Und abends im Städtlein,
 Da kehr ich durstig ein:
 "Herr Wirt, mein Herr Wirt,
 Eine Kanne blanken Wein!
 Ergreife die Fiedel,
 Du lustger Spielmann du,
 Von meinem Schatz das Liedel,
 Das sing ich dazu!"

5. Und find ich keine Herberg,
 So liege ich zur Nacht
 Wohl unter blauem Himmel,
 Die Sterne halten Wacht;
 Im Winde die Linde,
 Die rauscht mich ein gemach,
 Es küsset in der Frühe
 Das Morgenrot mich wach.

6. O Wandern, o Wandern,
 Du freie Burschenlust!
 Da wehet Gottes Odem
 So frisch in die Brust;
 Da singet und jauchzet
 Das Herz zum Himmelszelt:
 Wie bist du doch so schön,
 O du weite, weite Welt!

...

³Rimarkigo de Manfred Retzlaff: En la "Esperantista Kantaro", el kiu mi la tekston detajpis. la linio tekstis: Sub ĉielo min kuŝos. Sed tio verŝajne estas pres-eraro.

⁴Ŝanĝpropono de Manfred Retzlaff: La matenruĝ' min vekos

*Traduko de la Germana poemo “Der Mai ist gekommen” de Emanuel Geibel en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-235-466 (2006-05-07 20:51:04)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro “Esperantista Kantaro”, Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.

Traduko de la Germana poemo “Der Mai ist gekommen” de Emanuel Geibel en Esperanton de Ferdinand Pfeil.

Arg-235-465 (2004-04-27 10:37:11)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto “La verdaj paseroj kantas”, eldonita de la Esperanto-Grupo Espero, Berlino, en 1948.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Emanuel Geibel, publikigita 1841.

Arg-235-464 (2010-05-01 22:42:36)

Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Emanuel_Geibel kaj la Esperantan version http://eo.wikipedia.org/wiki/Emanuel_Geibel.